

Argentina E-Vento

Oficiala organo de Argentina Esperanto-Ligo
12-a jaro n-ro 30 julio / aŭgusto 2007 [2]

Turismo en Argentino

Vizito al Andaj montaro



Tra tuta Sudameriko, ekde *Cabo de Hornos*, (Ĉilio), en la sudo, ĝis Panamo, (Mez-ameriko), situas fama Andaj montaro. Ĝi mezuras pli ol 7.000 km longe, pli ol 240 km larĝe kaj pli malpli 3600 metroj alte sur la marnivelo, kaj etendiĝas ĉe la okcidenta parto de la kontinento, preskaŭ paralele al Pacifika Oceano. La plej alta monto estas *Aconcagua*, 6959 metroj alte. Supre kaj malsupre de tiu montaro ni trovas la plej variajn specojn da bestoj kaj plantoj. Andoj dividas Argentinon de Ĉilio sed estas la plej alloga kaj mirinda natura pejzaĝo, eĉ oni trovas dezertojn. Argentinaj provincoj ĉe la Andoj estas (de nordo al sudo): Jujuj, Salta, Catamarca, La Rioja, San Juan, Mendoza, Neuquén, Rio Negro, Chubut, Santa Cruz kaj Tierra del Fuego.

Argentina E-Vento

12-a jaro n-ro 30 jul / aŭg 2007 [2]
Oficiala organo de Argentina Esperanto-Ligo
[Argentina Esperantisto 1917-1995]
Aperas kvaronjare/*Trimestral*
Dissendita al 29 landoj - Interŝanĝo dezirata

Redaktoro -ekde 1996-

Rubén T. Diaconu Tkachenco
Calles 119 y 122
AR-H3700FTT Pres. R. Sáenz Peña
Argentino

rubendiaconu@yahoo.com.ar

Kunlaborantoj:

Rubén Sánchez: esperanto@neunet.com.ar
Emmanuel Maggiore:
emmanuelmaggiore@gmail.com

Pri la subskribitaj artikoloj respondecas iliaj aŭtoroj kaj ili ne nepre reflektas la opinion de AEL aŭ de la redaktoro.

Argentina Esperanto-Ligo

Fondita la 12-an de aprilo 1941
Re-fondita surbaze de AEL-AEA
la 9-an de decembro 1995
TTT-ejo: www.esperanto.org.ar
AEL-Estraro

Alcides Wentinck – *prezidanto*

René Arce – *vicprezidanto*

Jorge E. Cabrera – *sekretario*

Fernando Inocencio – *vicsekretario*

Mario J. Miranda – *kasisto*

José Dioguardi – *vickasisto*

Komisiitoj

Instruado – Teresita Alaniz

Libroservo – Mario J. Miranda

Disvastigado – Silvia Rottenberg

Arĥivo – Roberto Sartor

UEA Komitatano – Marcelo Casartelli

Ĉef-delegito – Rubén L. Sánchez

Kotizperanto – AEL/ Mario J. Miranda

Argent-EJO – Daniel M. Lucero

Se vi deziras kunlabori por la eldono kaj
dissendo de ĉi tiu revuo, vian
monkontribuon estos bonvena. Vd. p. 15

Enhavo

Turismo en Argentino.....*sur kovrilpaĝe*

El la Redaktejo..... 2

Análisis / Noticias /
Hispanlingva rubriko..... 3

Tra la lando..... 7

Amerike..... 9

Internacie..... 11

Alvoko.....15

Anoncoj.....15

Distraĵo..... 16

El la Redaktejo

Karaj legantoj:

Pluraj novaĵoj atingis la Redaktejon kaj laŭ nia konstanta deziro ni publikigas ilin por vi. Tio ebligas havi almenaŭ etan panoramon pri la evoluigo de Esperanto, ĉu en la lando ĉu en la mondo. Verdire ni konscias, ke tio estas nia tasko kiel oficialan organon de Argentina Esperanto-Ligo.

Krome, ni kore dankas al ĉiuj kiuj sentas sin parto de la argentina E-movado, kaj malavare kaj daŭre kunlaboras por la eldono kaj dissendo de tiu ĉi revuo.

Via redaktoro

Novedades del esperanto y su entorno

AEL y diversas actividades del esperanto han sido reflejados en medios de comunicación de nuestro país y del exterior.

Argentina-Panamá
El Consejo Iberoamericano distinguió a una institución argentina de esperanto
Tarea denodada y ejemplar consigue sus galardones.

El Instituto Argentino de Esperanto, (IdEo), fue creado y es dirigido por el Dr. Marcelo Casartelli, pero cuenta además, con un equipo de afamados profesores. El IdEo desarrolla sus actividades educa-

tivas enseñando la lengua internacional esperanto a través de su página de internet:

www.institutoesperanto.com.ar

Este año el Instituto recibirá el Máximo Galardón a la Excelencia Educativa otorgado por el Consejo Iberoamericano. Esto se llevará a cabo en la III Cumbre Iberoamericana a desarrollarse en Panamá, en el próximo mes de septiembre.

Carta recibida

por el Dr. Marcelo Casartelli

De nuestra mayor consideración:

Tengo el honor de dirigirme a Usted en nombre del Consejo Iberoamericano en Honor a la Calidad Educativa – CIHCE, expresándole nuestro cordial saludo y felicitación.

El Comité de Evaluación del CIHCE en sesión ordinaria lo han declarado Apto para recibir el Máximo Galardón de la Educación: “Premio Iberoamericano en Honor a la Excelencia Educativa 2007”

Este reconocimiento Iberoamericano es la más importante distinción otorgada a prestigiosas instituciones y profesionales líderes de la educación iberoamericana, que impulsan los valores éticos y humanos, formando hombres y mujeres de excelencia, que destacan en sus respectivas especialidades.

La Ceremonia de entrega del “IV Premio Iberoamericano en Honor a la Calidad Educativa 2007” se llevará a cabo los días 13 y 14 de septiembre del presente año dentro del marco de la Gran Cena de Gala, en el prestigioso Hotel El Panamá, en la ciudad de Panamá, (Panamá), evento al cual asistirán los más destacados profesionales e instituciones educativas iberoamericanas.



Afiche de la Cumbre Iberoamericana

Asimismo, le hacemos extensiva la invitación a la "III Cumbre Iberoamericana: la educación integral, clave del cambio". El evento académico más importante del año organizado por el CIHCE, a realizarse los días 11 y 12 de septiembre del presente año en el Centro de Convenciones del Hotel El Panamá, al que asistirán en calidad de ponentes y expositores los máximos líderes de la educación iberoamericana

Estos magnos eventos cuentan con el patrocinio del Ministerio de Educación de Panamá, el Consejo de Rectores de Panamá, Cátedra UNESCO-Educación para la paz y la comprensión internacional, (Argentina), The City University of New York, (USA), Secretaría de Estado de Educación Superior de República Dominicana, Colegio de Doctores en Educación, (Perú), Fundação Armando Álvares Penteado- FAAP, (Brasil), entre otros.

En calidad de ganadores, el CIHCE le hará entrega de las siguientes distinciones:

- Trofeo en Honor a la Excelencia Educativa 2007.
- Título de Doctor Honoris Causa
- Título de Magíster en Gestión Educativa
- Condecoraciones de Honor.

Esta será una excelente oportunidad para coronar el extraordinario esfuerzo realizado en beneficio del desarrollo de su nación y destacar entre los Líderes Supremos de la Educación Iberoamericana.

Agradecemos por anticipado la atención brindada a la presente, expresándole mis sentimientos de especial consideración y estima.

Atentamente,

Dr. Omar Leal Garrido

Presidente del Consejo Iberoamericano

Agradecimientos

Por las adhesiones y colaboraciones recibidas AEL agradece a: A. Aranda [Chaco], F. Veuthey [NL/AR], C. Prudkin [Neuquén], L. Barth [Neuquén], F. Zilli [Río Negro], NN [Chaco].

Buenos Aires Joven tandilense y su contacto con el esperanto

*Una experiencia interesante
y un trabajo modelo en la web.*

“Emmanuel Maggiori, un adolescente de 14 años, relató la experiencia que está viviendo desde que estudia el esperanto. Conversó con *El Eco* de Tandil acerca de los beneficios que aporta esta lengua y del crecimiento que ha tenido en los últimos años.

El esperanto nació en 1867, creado por un médico de apellido Zamenhof, quien estuvo 10 años trabajando para generar un idioma universal. Residía en una ciudad donde se manifestaban múltiples problemáticas entre etnias y por esa razón, pensó que la causa de estos enfrentamientos podía ser la lengua. Con esta premisa, surgió la idea de crear un idioma común.

Emmanuel explica que a veces se confunde el objetivo del esperanto, y se piensa que atenta contra las culturas "pero la idea no es suplantarse los idiomas, sino que sea una lengua auxiliar. Es una manera de poder generar encuentro entre personas que no comparten la misma lengua". Para Emmanuel, es un idioma muy fácil de aprender y tiene la ventaja, que como fue creado "desde cero", estuvo bien planificado y no presenta mayores dificultades para quien lo estudia.

Contacto con el idioma

A Emmanuel se le ocurrió estudiar este idioma luego de tener una charla con su mamá, acerca de cuál era la lengua universal. Afirmaba que era el inglés y su mamá le explicó que era el esperanto. En ese momento, buscó información acerca del tema, y más adelante, la curiosidad se hizo presa de él.

Lo primero que encontró al buscar en internet fue un curso, y decidió leer la primera lección "me pareció tan atrapante, que lo quise aprender. Imprimí varias lecciones y me gustó mucho, sobre todo por lo fácil y la libertad que uno tiene para deducir palabras, porque es totalmente regular". Luego, fue incorporando el vocabulario, que en su mayoría es de origen latín. Explica que el mismo cuenta con unas 8000 raíces que permiten obtener 100 mil palabras, agregándoles unos 40 afijos y sufijos.

Además, la base del esperanto es muy simple y por ejemplo, los adverbios terminan en "e", los sustantivos terminan en "o" y los adjetivos en "a".

Experiencias

Cuando Emmanuel empezó a aprender el esperanto, no se lo comunicó a su familia pero "después descubrí que era espectacular, muy lindo de aprender, porque es simple y además, hay una red de amigos que quieren aprenderlo".

Con internet, esta lengua ha sido ampliamente difundida, y si bien hay mucha gente que dice que murió, no es así "porque está más viva que nunca". Ejemplos de ello es que hay libros clásicos, de dominio público, que han sido traducidos y radios que transmiten las 24 horas, lo mismo que películas originales y traducidas. Además, otro de los elementos fundamentales de consulta en la web es la wikipedia, que fue traducida.

Para Emmanuel, lo más interesante de estar en contacto con este idioma, es que ha entablado amistad con muchas personas de distintos lugares y como el esperanto no tiene origen, en internet pasa de un link a otro, sin darse cuenta que cambia de país, hasta que observa atentamente el dominio.

Además, es una lengua que se sociabiliza activamente, y por ejemplo,

es común enterarse de la realización de distintos congresos.

Conclusiones

Según Emmanuel, debido a su raíz lógica, esta lengua facilita el aprendizaje de otros idiomas y a una edad tan corta, él es testigo de ello: ya está estudiando su sexto idioma. Así, incluyendo el español, adquirió el inglés, francés, italiano, esperanto, y en el último año, el chino.

De este modo, al estudiar este idioma "universal", Emmanuel se imagina la posibilidad de concurrir a congresos, poder viajar y compartir espacios con otros esperantistas, sobre todo, porque la gente que lo aprende es de distintas edades, y si bien hay muchos mayores, también hay grupos de jóvenes, que hacen congresos y otras actividades.

Para quien quiera aprenderlo o comunicarse por internet, puede ingresar a la página web:

www.esperantotandil.com.ar

Buenos Aires, 18 de mayo de 2007

EL ECO de Tandil para Internet

Gran Bretaña

Exitoso programa en Inglaterra

Dos escuelas estatales enseñan esperanto a más de 100 niños.

La noticia sobre más de 100 niños, entre 5 y 11 años de edad, que aprenden esperanto, a muchos puede parecer algo intrascendente. Sin embargo, no es así tratándose de la Gran Bretaña, donde los niños aprenden inglés obligatoriamente desde que nacen. Más extraordinaria aún, pues se trata de un reciente programa que dio inicio el año pasado y ya obtuvo positivos resultados y entusiastas repercusiones no solo entre los profesores sino también entre los alumnos.

La tarea para lograr esto fue realizada por Angela Tellier, integrante de la Comisión Directiva de “*Esperanto-Asocio de Britio*” que durante años estuvo trabajando y financiando en el proyecto “*Springboard to Languages*” (“programa de lanzamiento lingüístico”). Lograr que la enseñanza del esperanto sea aprobada no fue tarea fácil, pues históricamente la primera lengua extranjera es el francés. Sin embargo, en el marco de los cambios en la política lingüística de la Gran Bretaña fue posible establecer que el esperanto no solo es una lengua sencilla y fácil de aprender sino que también favorece el aprendizaje posterior de otras lenguas. El resultado final fue que la escuela Bar Hill en Cambridge y la escuela Scorton en la región nororiental de Inglaterra aceptaron este programa. Sin lugar a dudas, esto se logró gracias a la colaboración de muchos otros esperantistas y funcionarios oficiales que vieron con buenos ojos la enseñanza del esperanto. Además de capacitar a los niños en el tema general de la lingüística y la gramática, cabe subrayar que el esperanto hace posible el acceso a la cultura mundial, favorece el contacto e intercambio con todo el mundo, “...estamos educando a ciudadanos del mundo” dijo la directora del Scorton.

El proyecto está en constante crecimiento y evolución y es posible seguir su desarrollo, en inglés, en:

www.springboard2languages.org
Esperanto, marzo de 2007, pág. 51

República Checa Curso de esperanto en la Universidad Masaryk

En diciembre de 2006, en la Facultad de Pedagogía de la Universidad Masaryk, de Brno, República Checa, 59

estudiantes finalizaron sus estudios de esperanto para principiantes.

Durante 6 meses, con el material de *Mazi en Gondolando*, 3 horas por semana y divididos en dos grupos, los estudiantes realizaron las más diversas tareas, inclusive utilizaron el texto interactivo de la página

www.edukado.net.

Más de 20 de estos estudiantes se anotaron para el curso de 2 nivel. No se tiene la certeza de que los cursos de 3 nivel puedan continuar en dicha universidad, pero se prevé que puedan continuar en el Centro de Enseñanza Lingüística de la Facultad de Filosofía.

Josef Vojáček

Revista Esperanto,
marzo de 2007, pág. 69

Estados Unidos de Norte América Cursos de verano en la Universidad de California *Aprenda esperanto en la famosa Universidad de San Diego, en la bella costa del Sur de California.*

Como todos los años, los cursos de esperanto de verano, se desarrollarán del 9 al 27 de julio de 2007.

Durante 3 semanas intensas, alumnos provenientes de todo el mundo, participarán en 2 niveles de aprendizaje. Este año, los cursos contarán con la conducción de los profesores Paul Gubbins de Gran Bretaña y Lee Miller de los Estados Unidos. Las actividades didácticas se concentrarán en el uso intensivo del esperanto y en la vida y obras del gran poeta y escritor, profesor Willian Auld, (1924-2006)

Ellen M. Eddy

Revista Esperanto,
marzo de 2007, pág. 67

Tra la lando

Neuquén

E-kurso ankaŭ en 2007

En ĉefurbo Neuquén, kiel jam tradicie, ĉiu unua kaj tria sabato monate, de la 11h00 ĝis la 12h00, okazas E-kurson.

Ĝi disvolviĝas gvide de prof. Rubén Sánchez ĉe la publika biblioteko "Alberdi". Rimarkindas, ke la nuna kurso okazas ekde la 10-a de marto 2007 kaj ĝi estis dekarita municipa kultura intereso.

Córdoba: Gratulon!

Instituto Argentino de Esperanto (IdEo), ricevis premion

Estis aljuĝita premion al IdEo, kies ttt-ejo estas:

www.institutoesperanto.com.ar

Jen dankesprimoj de d-ro Casartelli, fondinto kaj direktoro de la instituto.

"Karaj geamikoj: Mi havas la plezuron informi al vi, ke la *"Consejo Iberoamericano en Honor a la Calidad Educativa"* aljuĝis al nia Instituto la plej gravan Premion de tiu institucio. Mi deziras kore gratuli kaj danki al vi, ĉar la premio estas merito de ĉiuj la membroj de la grupo, kiuj sindoneme kaj senlace laboradas por la instruado de Esperanto. Mi ankaŭ dankas al kiuj ĉiam apogis nin: en unua loko al d-ro Renato Corsetti, (prezidanto de UEA), kaj al ĉiuj la esperantistoj, kiuj kuraĝigis nin.

En septembro ĉi-jare mi pensas vojaĝi al Panamo por ricevi la premion kaj partopreni en la kunveno. Bonvolu akcepti miajn elkorajn salutojn kaj bondezirojn."

Sur paĝoj 3-4 (Hispanlingva rubriko) ni transkribas la leteron de CIHCE sendita al IdEo.

Buenos Aires

• Asembleo de Bonaera E-Asocio

Nova komitato de BEA.

Sabate, la 24-a de marto 2007, okazis Ĝenerala Asembleo de Bonaera Esperanto-Asocio, en la sidejo de strato Paraguay 2357, aĉetita de la bonaera esperantistaro en la jaro 1967.

Partoprenis trideko da personoj kaj dum la kunsido oni informis pri la nuna stato de la asocio, ties sidejo kaj la financa bilanco kaj ĉefe oni elektis novan komitaton.

Jen la nova elektita komitato:

Prezidanto: Jorge Enrique Cabrera

Vic-prezidanto: Alcides P. Wentinck

Sekretario: Fernando Inocencio.

Vic-sekretario: Bernabé Fernández

Kasisto: Stephanie Cabovianco

Vic-kasisto: Ary Borenszweig

Konsilantoj: Mario Miranda,

Silvia Rottenberg, Cecilia Prudkin

Anstataŭantoj: Alberto Aune,

Christian Hummel,

Emiliano Battaglia, Nicolás Ruso.

Kontistoj: Julio Wasch,

Inés Beaumont.

La asambleo aprobis la protokolon, bilancon, buĝeton kaj planagadon.

Krome estis aprobita riparadon de la sidejo por tuj komenci Esperanto-kursojn bazan kaj perfektigan.

• Esperanto en Taldil

Nia Lingvo komencas disvastigi en Tandil, urbo pli ol 300 km sud-okcidenten de la nacia ĉefurbo Bonaero. (Vd. sur *Hispanlingva rubriko*) En loka ĵurnalo oni publikigis artikolon pri Esperanto. Sed tre interesa kaj grava novaĵo estas, ke ankaŭ oni faris retejon

por informi pri la lingvo al la tandilanoj.
Se vi volas rigardi ĝin, ĝia adreso estas:

www.esperantotandil.com.ar

Emmanuel Maggiori, Tandil

- **Esperanto ĉe la Internacia Libro-Foiro**

De la 16-a de aprilo ĝis la 7-a de majo 2007, nome de la estonta *Escuela Argentina de Esperanto* bonaeraj esperantistoj ĉeestis la Libro-Foiron. Apud standoj pri lingvoj sukcese oni diskonigis pri Esperanto.

- **Vizitoj en Bonaero**

Pluraj esperantistoj, ĉu argentinanoj ĉu eksterlandanoj, vizitis la nacian ĉefurbon kaj kompreneble la sidejon de Esperanto.

Ili venis el:

Meksikio: Prof. Rubén Felman González, argentinano nun loĝanta en Mexicali, estas d-ro pri psikiatrio kaj

psikologio, kaj prezidanto de AIS-RSM-Mexico Branch. D-ro Feldman González estas iniciatinto de nova paradigmo en psikologio pere de Unueca Perceptado.

Kostariko: Vizitis nian landon kaj ĉeestis en Bonaero-urbo, inĝeniero Guido Hernández Marín. Li kaj sia edzino renkontiĝis kun esperantistoj. (Vidu pri li en Jarlibro kaj Pasporta Servo). Li jam estis en nia lando kaj ankaŭ siaj filoj kiu loĝis ĉe Silvia Rottenberg. Notinde, ke inĝeniero Guido studis en Rusio kaj sia edzino estas rusino.

Brazilo: Inĝ. Josefo Lunazzi, argentinano fizikisto nun loĝanta en Campinas.

- **BEA bonvenigas novajn lernantojn**

Okaze de la nova E-kurso ĉe la sidejo de BEA oni bonvenigas la gelernantojn.

La kurso komencis la 13-an de majo kaj la gvidantoj estas Aneta Ubick, Stephanie Cabovianco kaj Ary Borensweig. Gratulojn al ili kaj sukceson por la kurso.

- **Esperanto en municipa ttt-ejo**

La reta paĝo de la Municipa Lernejo de "José C. Paz" (Provinco de Buenos Aires), nun havas resumon en Esperanto. La celo de tiu lernejo estas instrui lingvojn, metiojn kaj aliajn studobjektojn al malriĉuloj kaj handikapitoj. La direktoro estas prof. Carlos Víctor Zalazar, kiu lernis Esperanton antaŭ multaj jaroj. La aldono de tiu resumo estas grava kontribuo por la disvastigo de nia lingvo en Argentino. Oni povas vidi ĝin en ĉi tiu retadreso:

<http://www.emfp402.com.ar>

Bonvolu klaki sur "*Historia*", kaj poste sur "*Otros idiomas*".



Dankan kaj gratulan mesaĝon al la urbestro kaj al la prof. Zalazar bonvolu sendi en la hispana aŭ Esperanto al jena retadreso: cavizar@hotmail.com
D-ro Marcelo Casartelli

Chaco

Nova panelo por la placo Esperanto

Laŭ informo de Saenzpenja E-Klubo, ekde la 1-an de junio 2007, la placo Esperanto en Presidencia Roque Sáenz Peña havas novan panelon kun la nomo.

Historie: La placo ricevis la nomon Esperanton en la jaro 1989, dum la 49-a Argentina E-Kongreso. Bronza plato estis inaŭgurita en la jaro 1992, tiu kiu aperas en la libro *Monumente pri Esperanto*. Tamen dum 2000 ĝi estis ŝtelita. La placo estis plene renovigita en 2002 kaj belaspektis, eĉ la E-flago ofte videblas dum festo-tagoj.

Nun dank' laboro de la komisiono de la kvartalo "Oro Blanco" kaj helpe de la Municipa Registaro eblis starigi feran tabulon, kiun videblas sur foto. Ĝi mezuras proksimume 1,50m x 1,50m, kaj 2,30 alte.

Amerike

Kostariko

Bona novaĵo el Latinameriko!

*Nova kurso ĉe la
Universitato de Kostariko.*

La ĉi-jara baza E-kurso en Universitato de Kostariko komenciĝis la 9-an de marto kaj etendiĝis ĝis la 30-a de junio.

Temas pri oficiala, ses-monata kurso, kun valoro 3-kreditunuoj kaj alirebla por ĉiuj bakalaŭr-planoj. La nombro de studentoj estas 22. Salutvortoj kaj kuraĝigmesaĝoj per bildkartoj estis ricevitaj kiuj tiamaniere eksciis pri nia lingvo: do efika propagandilo!

Je la fino de la kurso la instruisto priaranĝis ekspozicion kaj donacis ĉiujn bildkartojn al la lernintoj kiel memorajojn.

Pro tio, ke la plejmulto de la studentoj estas junaj kaj ĉiuj amikiĝas kun TTT, oni ankaŭ utiligas la reton. La semo ne ĉiam fruktdonas, tamen almenaŭ du aŭ tri el ili ja interesiĝas pri E-o kaj ties kulturo kaj poste daŭrigas meme aŭ frekventas la tian E-klubeton =>



Najbaroj de la kvartalo kaj SEK-anoj. (Fotis Alicia Aranda)

kun nomo “Carlos Gagini”, la unua loka kaj grava lingvisto kaj filologo, sed ankaŭ pioniro ĉi-tiea kiel esperantisto. Oni starigis la unuan ZEO en Kostariko kaj plej eble, en Mezameriko.

Kontaktadreso: miaumiau1@ice.co.cr

Prof. Hugo Mora, Curso de Esperanto, Escuela de Filología, Lingüística y Literatura, Universidad de Costa Rica, San José, Costa Rica.

Pri Projekto NESTO

Malĝoja novaĵo

pri sukcesa projekto.

Karaj Instruistoj de Projekto Nesto. Post preskaŭ 4 jaroj de Projekto Nesto, ni devas alveni al serioza simpligo de nia projekto:

1. Nesto-Diplomo ne plu ekzistas.

Ekde aprilo 2007, ni ne plu liveros diplomojn al niaj nestidoj, surbaze de internacia ekzameno, kiu havis la apogon de Kibernetika Pedagogia Grupo de USP, ĉar tiu grupo ne plu havas kapablon doni al ni la necesan apogon pro manko de homaj fortoj kaj ĉefe Esperanto-lingva strukturo.

2. Nesto-Atestilo por konstati la selvaĉon de la kurso.

Ni liveros atestilon al la nestidoj, kiuj sukcese finis la kurson, surbaze de informoj de la propra nesto-instruisto, kiu akompanis la evoluon de la lernanto dum la kurso. La modelo de tiu nova atestilo estas preparata kaj baldaŭ ĝi estos prezentota al ĉiuj.

3. Google-anoncoj por PN laŭ petoj.

Google-anoncoj estos farataj nur por landoj laŭ specifaj petoj de naciaj reprezentantoj aŭ movadaj reprezentantoj. La petantoj estoj tiuj, kiuj ankaŭ provizos monon por tion fari la anoncojn.

4. Projekto Nesto ne plu estos strikte subtenata de Grupo Monda.

Ni ne plu inkluzivos Grupon Mondan kiel striktan subtenanton kaj posedanton de la projekto, ĉefe por liberigi la

projekton por migri sian administracion kien ajn, laŭ interkonsento de nesto-instruistaro kaj laŭ UEA/ILEI intereso. Projekto Nesto jam akiris tre gravajn rezultojn por resti sub decidoj de simpla administracio.

Mi estas preta por klarigi tiujn gravajn decidojn kadre de niaj administraj listoj. Tamen, *kelkaj respondoj al eventualaj duboj* ekestas:

1. Diplomoj:

La movado jam provizas Internaciskale kaj naciskale diplomojn. Ĉiuj nesto-instruistoj, en siaj landoj, devas iel subteni tiujn diplomojn kaj indiki al siaj lernantoj kiel akiri ilin. ILEI certe provizos internacian elektronikan diplomigon en la proksimaj jaroj. Do, Projekto Nesto ne povas konkurenci al tiu tendenco, sed kontraŭe, devas subteni. La kompetenteco de Projekto Nesto estas por instrui Esperanton al elektronikmedia interesato pri Esperanto kaj helpi la nestidon fariĝi esperantisto.

2. Vivodaŭro por Projekto Nesto:

Projekto Nesto jam fariĝis pli granda ol Grupo Monda. Grupo Monda estas regiona grupo de esperantistoj, en Brazilo, kun intereso pri socia servado.

Ĉar Grupo Monda havas aliajn interesojn krom Esperanto-instruado, ni devas malligi la celojn je tiu punkto por helpi al ambaŭ celoj. Tamen, Grupo Monda daŭre apogos la projekton ĝis la punkto, kiam ĝi devas aliri al iu pli grava instanco.

Adonis Saliba, Brazilo

Chile

Sepa landa Esperanto-renkontiĝo

Ĝi okazis la 30-an de junio 2007, en Santiago de Chile, ĉe la sidejo de *La Casa del Maestro*.

Organizis: *Asociación Chilena de Esperanto*. www.esperanto.cl

Internacie

Novaĵoj pri muziko kaj DVD

Kun la proksimiĝo de la somero kaj la multenombraj renkontiĝoj kiuj tiam okazos, Esperanto kaj ĝia muziko ne malĉeestos -- kaj la 2007-a versio de FESTO estos sendube ĝia bela plejbonaĵo!

Por tiuj kiuj ankoraŭ ne provis la Esperanto-praktikon kiel manieron por interŝanĝi en la mondo kaj vojaĝi ĉe la suno, Vinilkosmo proponas al vi novan DVDon por progresi en tiu direkto ĝustatempe por profiti pri tiuj renkontiĝoj!

Via kontribuo kaj subteno estas petata de Duoble Unu, kiu preparas sian unuan KDon, eksternorman pro ĝia originaleco, kaj bezonas vin por plenumi kiel eble plej bone tiun projekton; dum Denis Rock Tamba atingis sian celon je la apero de lia video, 'Libra', pri kiu ni ofte parolis en niaj paĝoj.

Radio Polonia kaj eĉ Vinilkosmo elektas novajn komunik-rimedojn provante profiti pri la evoluo de la novaj teknologioj kun la celo daŭrigi la disvolvigon de la sono kaj la guston de la senlima lingvo kiel eble plej larĝe, kaj plejverŝajne aliaj aplikoj evoluos en tiu direkto kaj naskiĝos en la venontaj monatoj.

Nia kompleta katalogo ĉe:

<http://www.vinilkosmo.com>

Vinilkosmo-novaĵoj

VKKD R3

"*Esperanto Elektronike*" XXX

"Esperanto Elektronike" estas DVD uzebla per komputilo. Ĝi estis kreita por informi pri Esperanto, por lerni kaj utiligi ĝin. En tiu ĉi DVD estas tre varia kaj abunda materialo kies celo estas

malkovrigi Esperanton aŭ esti fonto de utila lernmaterialo.

Per ĝi, vi povos ricevi sperton pri Esperanto kiel kultura internacia lingvo, vivanta kaj funkcia, kiu sendube meritas apartan atenton kaj pli larĝan disvastigadon.

Informo: Vi scios kio estas esperanto, ĝian historion, ĝian iniciatinton, ĝian komencon kaj evoluon.

Lernado: Esperanto-kurso ekde la unua grado ĝis profesora nivelo. Ĉiu povas trovi por si aferojn laŭ sia intereso kaj kapablo.

Utiligado: Diversaj eblecoj por uzi la lingvon: spekti filmojn, aŭskulti muzikon, legi librojn kaj revuojn, fari ludojn, ktp.

Tiu ĉi DVD estis preparita de la E @ I - teamo – junulara internacia organizo prizorganta diversajn projektojn rilatantajn al:

Edukado@Interreto, kaj kies ĉefaj celoj estas iniciati kaj instigi al interkultura studado, kaj subteni la utiligon kaj studadon de interreto kaj lingvoj.

Kunlaboris al tiu projekto trideko da personoj, dekduo da asocioj kaj organizoj (interalie EUROKKA kaj Vinilkosmo), 23 verkistoj kaj 28 artistoj esperantistaj, kaj Esperantaj muzikbandoj.

Notindas ke la enhavo estas en 28 diversaj lingvoj!

Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi:

<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vk kdr3&lng=e>

Pasko 2007

Papo

Benedikto la Deksesa salutis en Esperanto

Dum la Paska solena ceremonio, Delsendita far centoj da televido kaj radioj el la kvin kontinentoj,



Esperanto en Vatikano.

de Benedikto XVI en Ratisbono la 12an de septembro 2006 eble enhavas la plej gravan teologian kaj filozofian novaĵon en la katolikismo, de post multaj jaroj. Kiel ofte okazas ĉe interesaj aferoj, la atento estis deturnita al parentezo kun ekzempla

Papo Benedikto la dekseca ankoraŭ foje salutis en Esperanto. En Piazza San Pietro ĉeestis ankaŭ grupo da italaj geesperantistoj kiuj brue kaj bunte substrekis la saluton de la Papo en la Internacia Lingvo.

Pliaj detaloj kaj fotoj ĉe:

<http://www.ikue.org/pasko2007/pasko2007.htm>

Francesco Amerio, Italio

Eseo de konsulo de Esperanta Civito

Okaze de tiu saluto de la Papo, Heroldo Komunikas publikigis eseon de la (tiam ankoraŭ ne) Konsulo de la Esperanta Civito, cirkulintan ĝis nun nur en la itala lingvo. Estas medito pri la lekcio de Papo Ratzinger en Ratisbono, 12 septembro 2006, kiu kaŭzis fortajn protestojn en la islama mondo. Prof. Giorgio Silfer, kvankam senkonfesia laiko, intervenis defende al Benedikto XVI.

Verŝajne li estis la sola senkonfesiulo kiu tion faris "La lekcio fare

valoro.

Papo Ratzinger min surprizis ĝojige, kiel senkonfesian laikon, pro sia analizo, kiu superas longan tradicion ekster-raciisman en la kristana kaj katolika penso. La papo el bavara origino dissolvis kontraŭdirojn post-renesancajn, ekde la kontrasto inter "homo kreda" kaj "homo racia" ĉe Bernardino Telesio, tra la antihelenisma rejhetokrizo de la (kontraŭ)reformo, ĝis la disponebloj (tamen nur en estetiko) de la lombarda filozofo Antonio Rosmini, ĝis novomismo kaj la streboj de modernismo, lasta granda fenomeno de renovigo en la romkatolika mondo, proksima al la religieco de Giuseppe Mazzini, kaj vrakinta pro la reago (aŭ reakcio) sub Pio X.

En la lekcio de Ratisbono Benedikto XVI kontestis la redukton de la racio je simpla ornamo, la negon pri ĝia kapablo trafi la bonon kaj la veron sen helpo transcenda (kiu daŭre necesas por la "savo"). Lia kontesto bazas sin sur la koncepto de "analogia entis", tiel formulita de la kvara Laterana Koncilio:

Inter creatorem et creaturam non potest tanta dissimilitudo notari, quin inter eos maior sit dissimilitudo notanda.

El tio papo Ratzinger iras ĝis kritiko pri ĉiu klopodo por malhelenigo de la kristanismo, nome por nego pri la renkonto (perceptita kiel providenca) inter la biblia mesaĝo kaj la greka penso (filtrita tra la kategorioj de la kristanismo). Heroldo de tiu malhelenigo, en la teologia panoramo de la pasinta jarcento, estis la luterana Adolf von Harnack, citita en la ratisbona lekcio. Sed la radikoj de tiu penso sobas pli funden, kvazaŭ konstanta tento en la kristanismo, ĝis la volontismo de Duns Scoto kaj la bibliismo de Lutero (lia principo *Sola Fide, sola Gratia, sola Scriptura*). Ili eĉ atingas la Malnovan Testamenton, se ni legas Eliron 24: 7 “*kaj ili diris: ion, kion diris la Eternulo, ni faros kaj obeos*” – tiel, ke la aliĝo de la juda popolo al Bono venis antaŭ ol la kono pri Bono mem, nome ili estus akceptintaj la Toraon antaŭ ol koni ĝin, kaj tiel la bono ne bezonus rekoneblon fare de la racio: la bono estus tio, kion Dio decidas kiel bonon, eĉ se arbitre.

Laŭ tiu linio ni atingas teologian kritikon kontraŭ Islamo. “Ĉu Islamo estas perforta religio?” – jen la aktuala demando, fontinta el la citaĵo el la bizanca imperiestro kaj humanisto Manuelo II Paleologo.

Pri la citaĵo kiu kaŭzis la reagojn de la islama mondo, kaj interesus la politikiston pli ol la filozofon, mi deziras emfazi du cirkonstancojn. La unua estas la dato de la lekcio: la tagon post la Dekunua de Septembro. La dua estas la referenco ne tiom al la vortoj de Manuelo II Paleologo (el kiuj Benedikto XVI distanciĝas per prudenta, eĉ se iom tautologia *la imperiestro, kun akreco tre surpriza kiu nin mirigas, asertas...*), kiom al la samloke cititaj vortoj de Ibn Hazn, deklaranta *ke Dio eĉ ne estus*

ligita de sia propra parolo kaj nenio devigus lin malkashi al ni la veron. Se tia estus Lia volo, la homo devus eĉ praktiki idoladoron.

El teologia vidpunkto, la plej tikla problemo ne estas la sankta milito, sed la nuligo de la individua volo en tiu de Dio, karakteriza por Islamo, el kio devenas ankaŭ la sankta milito, la martira sinmortigo, la perforto kontraŭ la aliaj kaj si mem nome de la kredo, kaj kontraste kun la racio, interpretata de papo Ratzinger laŭ la linioj de la helenisma filozofio.

Sed kio do igas religion “perforta”? Unue la teologia doktrino mem: Islamo povus esti difinita kiel perforta ĝuste pro sia maniero antaŭmeti la demandojn de Vero kaj Bono, dekroĉante ilin el la rezonemo kaj komprenemo homaj. Efektive tio okazas en ĉiuj pensofluo de la Umao, kiu tiel similas al la menciita judaro ĉe la ceremonio de la interligo. Sed laŭ tiu perspektivo (aŭ retrospektivo) ankaŭ hebreismo estus religio strukture “perforta”, trans sia historia itinero. Kaj ankaŭ kristanismo, laŭ kelkaj internaj prilaboroj teologiaj kaj filozofiaj. Kiom da okcidentanoj, kies civilizo radikas en la kristanismo, veantaj kontraŭ la islama fundamentismo, pretus akcepti tian bu-merangon?

Benedikto XVI, kiel eminenta teologo, emfasis la limojn de strikte teologia analizo, ĉiukaze farinda, por delokigi la diskurson al nivelo homa kaj racia (do ankaŭ historia): la nivelo kiu ebligas la kunvivon kaj la dialogon inter la religioj. La volboŝlosilo estus humanismo aŭtenta, fondita sur racio kiu ne ekskludas la transcendon; humanismo kiu eĉ akceptas la transcendon. Tia humanismo ebligis la mezepokajn diskutojn inter hebreaj, kristanaj kaj islamaj intelektuloj. Laŭ honorkodo: la komuna sagaco, la homa akordo.

La apudigo de tiuj citaĵoj al la dato de la Dekunua de Septembro efikis eksplode: la islamaj reagoj estis emocia kaj politika, ne racia kaj teoretika. Verdire Benedikto XVI ne estis tenera kun la sekulariĝinta okcidento; sed ĝuste la reaktivigo de la religio kiel esenca elemento de la okcidenta civilizo, apud la racio, fortigus la konsideron pri eklezio kontrasta al la umao, kvankam heroldo de konfronto sen perforto.

La lekcio de Ratisbono estas grava teksto, kiu meritas legon kaj profundigon fare de ĉiu eŭropa intelektulo (inkluzive de ateisto, kiu, kiel Gaston Waringhien, estu bona konanto pri la sanktaj skriboj), tial ke sintezo pri la helenisma penso kaj la jude-kristana etiko situas ĉe la origino de nia civilizo.

Laŭ mi ne estas hazardo ke ĝuste germana teologo tion interpretis: ja la transiron de la antikva al la meza epoko, de la mediteranea kaj helenisma Eŭropo al la karola kaj kristana Eŭropo, gvidis ĝuste la bezono integri du elementojn fremdajn al la radikoj de la romieco – unuflanke la ĝermanismon kaj aliflanke la monoteismon nek senpersonecan nek emanisman el hebrea origino.

Heroldo Komunikas 327 8-A, 8 apr 07

Ni ricevis

La Redakcio kore dankas pro jenaj E-ricivaĵoj:

Esperanto [NL],
Heroldo de Esperanto [CH],
La KancerKliniko [FR],
La Espero [SE], Bazaro [RO],
Antaŭen [ES].

Se via sendo ne aperas Bv. informi al la Redakcio.

Eŭropa Unio Feminista E-movado kaj Margareta Handzlik

Margareta Handzlik, kristande-mokrata EU-parlamentano, akceptis, 20 marto 2007, en Bruselo, en sia oficejo ĉe Palaco Altiero Spinelli, la tutan Komitaton de Feminisma Esperanta Movado: Marie-France Conde Rey, Agneta Emanuelsson, Jarl Hammarberg, Anna Lászay kaj Perla Martinelli. Ĉeestis ankaŭ s-ino Magharova.

La delegacio prezentis sin kaj informis pri FEM. S-ino Handzlik aparte ĝojis revidi la du komitatanojn el Svedio, lando kie ŝi ofte prelegis kaj libertempis. Perla Martinelli parolis pri la revuo "Femina" kaj donacis la ĵus aperintan numeron. La E-feministoj klarigis la gravecon de la FEM-deklaro okaze de la Oka de Marto 2006, kaj liveris al la EU-deputito ĝian tekston: ŝi promesis doni opinionon.

S-ino Handzlik laboras ĉefe por la komisionoj Interna merkato kaj Defendo de la konsumantoj, ankaŭ Mercosur kaj Golfaj (arabaj) Landoj. Tial ŝi ne intervenas en la komisiono Defendo de virinaj rajtoj, sed volonte ŝi rilatigis la FEM-anojn kun la gvidantoj de tiu komisiono.

Ni spertis en nia interparolado (ĉiam en Esperanto) grandan intereson fare de la EU-deputito, kiu promesis resti en kontakto kun FEM.

Estis ankaŭ pozitiva mencio pri la Esperanta Civito (ges-roj Handzlik intencis ĉeesti la promulgadon de la Ĉarto de Sabloneto en 2001).

La unuhora aŭdienco finiĝis per reciproka disdono de donacetoj: Anjo Amika donis sian laste aperintan muzik-diskon.

*Marie-France Conde Rey
Heroldo Komunikas 327 3-B, 29 mar 07*

Alvoko

Mesaĝo por la argentina esperantistaro

Karaj membroj de AEL:

Nia Ligo travivas specialan situacion. Ne temas nur pri la landa ekonomika situacio, (nuntempe pliboniĝanta) sed ankaŭ pri nia interna situacio kaj kian estonton ni konstruas.

Ni jam havas daton por nia Jarasembleo: la 13-an de oktobro 2007, en la sidejo de Bonaera E-Asocio.

Jen, i.a. kelkaj gravaj kaj pritraktindaj temoj:

a) funkciado kaj aktivado de la Argentina E-Lernejo kaj ĝia rilato kun AEL,

b) strategia laborplano 2008: 2008-2012,

c) AEL kiel institucio oficiale registrita kaj valida laŭ argentina juro, (nur tiamaniere oni povos stariĝi plene akceptita),

d)...aliaj temoj proponotaj.

Sed...ĉi tiuj temoj meritas la koncernan debaton de AEL, kaj nian profundan studadon antaŭ la Asembleo.

Pro tio oni klopodos stariĝi specialan foron aŭ retliston por pritrakti la temojn. Oni planas fari sukcesan asembleon allogante la ĉestadon de AEL-anoj dum tri tagoj por ke ĉiuj havu la eblecon vojaĝi kaj do, debati, akordi, unuvorte: renkontiĝi kun siaj amikoj, ja en kamaradeca etoso. Pro tio oni aranĝos ĉion necesan oferante lokojn por tranokti, senpagan manĝaĵon, eble pagante parte aŭ tute la busbileton, ktp. (tranoktado kaj manĝaĵo proviziotaj de bonaeranaĵoj)

Bv. partopreni kaj sendi proponojn, leterojn, kaj sugestojn al la sekretario.

Retpoŝta adreso:

sekretario@esperanto.org.ar

AEL necesita su adhesión

Si Ud desea abonar su adhesión o colaborar con las tareas de AEL envíe su donación mediante depósito en Banco Francés, [sin costo], cuenta N° 147-005789/3, a nombre de:

Alcides Pieter Wentinck DNI 93.709.394

Calle Libertad 3226

B1602DJD Florida, Vicente López

Buenos Aires

y luego indefectiblemente informe sobre dicha operación a:

wanelec@sion.com

Si desea colaborar con la edición y distribución de la revista **Argentina E-Vento** también puede enviar su contribución mediante el "Banco Patagonia", depositando su aporte en "Caja de Ahorro" suc. 110, Sáenz Peña, cuenta N° 394101439, del Sr. Oscar C. Monge, [sólo se descontará \$7,27 como gasto bancario por depósito].

Rogamos siempre informar sobre su operación a esta redacción:

rubendiaconu@yahoo.com.ar.

Comunicado

de la redacción. Ver pág.2

El tesorero de AEL informa: Teniendo en cuenta que si hasta la fecha Ud. ha recibido en su domicilio la revista impresa *Argentina E-Vento*, pero no ha realizado su aporte correspondiente, la revista, no podrá ser enviada por correo postal. De no contar con una respuesta satisfactoria al respecto la redacción interrumpirá los envíos.

Además, deseáramos saber si:

- * la revista es de su interés, o no es de su interés.
- * la calidad de la revista no es la esperada.
- * si el contenido es escaso.
- * no lee la revista.
- * lee la revista virtual y no la impresa.
- * no la recibe en su domicilio.
- * el correo postal no la entrega en tiempo y forma.
- * ha aportado y no se lo han reconocido.
- * no desea aportar mas para la revista.
- * etc., etc."

Golfa kaj genia rakonteto

Paro geedza praktikas golfon, kaj edzo diras:

--Karulino, ne batu tiom forte, ĉar povas esti akcidento.

Samtempe kiel li parolas, la edzino forte batas la pilkon, kaj ĝi preteriras vitran fenestron.

--Ho, ve, mi diris al vi! --plorkrias la edzo. --Kion fari?, jes ni iru pardonpeti la sinjoron de la domo....

Tien ili iras, kaj eniras domon kun pecoj da vitroj sur ĉien, kaj rompita botelo sur la planko. Edzo demandas:

--Pardonu, sinjoro, ke ni havis akcidenton golfan..., kompreneble, ni pagos.

La dommastro rigardas la paron ĝojplene, kaj diras:

--Ho, neniel, sinjoro mia! Vi sciis, ke mi estas genio, kaj via pilketo detruis mian botelan karceron dum mil jaroj. Do, mi povas doni tri dezirojn, kaj mi donos unu al vi, alian al via edzino, kaj mi havos la trian por mi mem.

--Ho!--, diris la edzo, --tiukaze, mi deziras milionon da eŭroj jare dum la

cetera parto de mia vivo!

--Farite!--diris la genio. Venontfoje, kiam vi iros al via banko, vi trovos tie milionon da eŭroj krom tio, kiom vi jam havis.

--Nu, mi ankaŭ deziras havi unu domon en ĉiu lando en la mondo--, diris la edzino.

--Konsentite! --la genio diris. --Sed nun ankaŭ diru mian deziron: dum pli ol mil jaroj, mi ne seksumis. Mia deziro estu, ke mi kuŝu kun via edzino nun ĉi tie.

La geedzoj rigardas unu la alian, kaj fine la edzo diras:

--Bone, konsiderante, ke ni havas domon en ĉiu lando en la mondo, kaj milionon da eŭroj jare, kial ne?

Sekve, la genio kaj la edzino iras aliĉambren, kaj ili havas genian seksumadon dum pli ol du horoj. Poste, kiam la ama afero jam malsupreniras, la genio demandas la edzinon:

--Kiom jaraĝa estas via edzo, kara?

Ŝi diras:

--Tridek kvin.

Kaj la genio konkludas genie:

--necesas esti idioto kredi pri genioj en tridekvinjaraĝo!

Antaŭen n-ro 37, 2007 (ES)

Sr/a :

